

Mark Fettes

Simon Fraser University, Kanado / Canada

CED 70-jara: vojo, bilanco, perspektivoj

Resumo: Fondita en 1952, la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) evoluis el sia komenca celo, liveri faktojn kaj analizojn subtene al la internacia lingvo Esperanto, al multflanka esplorinstituto pri lingvo-planado kaj lingvo-mastrumado en monda kunteksto. Ŝlosila periodo estis la lastaj du jardekoj de la 20-a jarcento, kiam diversaj periodaĵoj kaj konferencoj helpis krei kaj aktivigi internacian reton de esploristoj pri esperantologio kaj interlingvistiko. Tio kredeble kontribuis al la kreskanta akcepto de Esperanto kiel inda esplorobjekto en diversaj disciplinoj; aliflanke, ankoraŭ ne realiĝis la pli vasta celo, ke multlingveco ricevu taŭgan atenton en la aliroj de la ŝtatoj kaj la interŝtataj organizoj al daŭripova evoluigo, homaj rajtoj, kaj simile. CED plu aŭspicias kaj subtenas esplorojn sur tiu tereno, samtempe serĉante solvojn al diversaj daŭraj defioj en la faka pritraktado de Esperanto, interalie la konservado kaj alirebligado de kolektoj kaj la analizado kaj evoluigo de la faka lingvaĵo en la kadro de la internacia terminoscienco.

Ŝlosilvortoj: Esperantologio; Interlingvistiko; Lingvo-planado; Multlingveco; Historio de socilingvistiko.

La Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) fondiĝis en 1952 sub iom malsama ŝildo. En tiu komenca stadio, ĝi laŭnome fokusiĝis al “la Monda Lingvo-Problemo” – unueca formulo, kiu implice referencis la perspektivon de movado por tutmonda neŭtrala lingvo. Kaj, efektive, legante la originan celaron de la Centro en la retejo de Universala Esperanto-Asocio (UEA),¹ oni trovas la taskojn “antaŭenigi la sciencajn esploradojn pri Esperanto ‘kaj ĝiaj multflankaj aplikoj en ĉiuj sferoj de la vivo’; prizorgi la kolektadon kaj ellaboradon de findindaj dokumentoj pri Esperanto; kaj subteni la informan laboron ĉe internaciaj organizaĵoj, fakaj kaj sciencaj rondoj, kaj la ĝenerala publiko” (UEA 2023). Origine, do, CED estis konceptita kiel faka instituto subtene al la sociaj-politikaj celoj de la Esperanto-movado.

1 Fondita en 1908, UEA estas la plej grava tegmenta organizo de la tutmonda Esperanto-movado. La lanĉo de CED en 1952 troviĝis inter diversaj klopodoj refortigi kaj pliprofesiigi la agadon de UEA post la dua mondmilito. Formale, CED restas parto de UEA ankoraŭ hodiaŭ, kvankam ĝi jam delonge prizorgas sian propran agadprogramon.

La motoro de tiu frua CED estis Ivo Lapenna, kroata profesoro pri internacia juro kaj multjara gvidanto de UEA. Li estis, laŭ ĉiuj indikoj, komplika homo (ekz. Fettes 2009; Lins 2014), kaj la posta historio ĵetis ombbron sur lian reputacion, sed li alportis tre sanigan emfazon pri la graveco de faktoj kaj analizoj. La volumo *Esperanto en Perspektivo*, iusence lia ĉefverko kaj certe unu el la ĉefaj fruktoj de la unuaj dudek jaroj de CED, portas ĝuste tian subtitolon “Faktoj kaj analizoj pri la Internacia Lingvo” (Lapenna, Lins, kaj Carlevaro 1974). Por Lapenna, tiu dokumenta kaj esplora laboro estis ĉiam subordigita al la granda celo konvinki la mondon uzi Esperanton, kaj tio estas plene komprenebla, se ni memoras la regantan skeptikon kaj ignoremon inter intelektuloj de tiu epoko (pri tio vidu ekz. Piron 1991, kiu citas multajn ekzemplojn de negativaj sintenoj al Esperanto ĉe la eŭropa klerularo kaj analizas la psikajn mekanismojn malantaŭ ili). Estis do verŝajne necese, ke tiuj unuaj paŝoj al serioza sistema esplorado pri la lingvo okazu en la rondoj de la konvinkitoj.

Kiel oni povus atendi, la unua granda paŝo ekster tiujn rondojn estis almenaŭ parte instigita de junuloj, kiuj venis sub la influon de Lapenna en la Internaciaj Seminarioj de Germana Esperanto-Junularo kaj alimaniere (Fettes 2009). La brito Victor Sadler, kiu eklaboris en la Centra Oficejo de UEA fine de 1962, 25-jara, estis unu el la ĉefaj ideantoj kaj la unua redaktoro de la revuo *La Monda Lingvo-Problemo (LMLP)*, per kiu CED unuafoje provis alparoli la vastan akademian mondon. La unua numero de LMLP aperis en 1969, en historia momento kiam kreskis faka interesiĝo pri la rilatoj inter multlingveco, lingvo-planado, kaj ekonomia kaj socia evoluigo (Tonkin 1997). Rigardante de la nuntempo, ni povas vidi tion kiel gravan turnopunkton en la memkompreno de CED, ĉar neeviteble la fluo de ideoj estis dudirekta: la esperantistoj portis siajn spertojn kaj sian vidpunkton al la neesperantista faka mondo, sed inverse, konceptoj kaj pensotradicioj el tiu mondo komencis penetri la iom enfermitan mondon de tio, kion ni nun emas nomi esperantologio kaj interlingvistiko.

En la komenco tiu evoluo estis malrapida. Tamen, en 1974, kiam Lapenna ekŝiĝis el ĉiuj siaj postenoj en UEA pro malsukceso en la tiujaraj elektoj, aliaj junuloj el la generacio de Sadler – inter ili Humphrey Tonkin, Jonathan Pool kaj Ulrich Lins – alportis novajn ideojn kaj novan energion al la laboro de CED. Pool fariĝis ĝia Aganta Direktoro dum ses jaroj, interalie lanĉante en 1978 la Esperantologiajn Konferencojn kadre de la Universalaj Kongresoj de UEA (Tonkin kaj Raola 2020); Lins iniciatis la *Novajleteron por Interlingvistoj*, por kunigi kaj kunlaborigi pli vastan reton de esploristoj sur la kampo; kaj Tonkin, post ses jaroj kiel Prezidanto de UEA, transprenis en 1980 la redaktadon de la posteulo de LMLP, *Language Problems and Language*

Planning (LPLP) (Fettes 2009). En tiu periodo, ni vidas elformiĝi kelkajn el la ĉefaj agadoj kaj gvidaj konceptoj de la moderna CED.

La okdekaj kaj naŭdekaj jaroj alportis multajn ŝanĝojn en la kondiĉoj de laboro por kaj pri Esperanto, interalie pro la fino de la Malvarma Milito kaj la kreskanta graveco de Interreto ekde la mezaj 90-aj jaroj. Dume la sociaj sciencoj trairis la unuan ondon de la post-modernismo, kiu helpis malfermi multajn fakojn al novaj influoj kaj novaj demandoj. Laŭ mia scio, neniu jam verkis studon pri la efikoj de tiuj evoluoj al la kampoj de esperantologio kaj interlingvistiko, sed mi kredas ke multaj nunaj fenomenoj havas siajn radikojn en tiuj du jardekoj. Limigante nin nur al la agadoj de CED mem, ni povas konstati, ke ekde 1992 Detlev Blanke, antaŭe ŝlosila aktivulo de la orientgermana movado, fariĝis la plej longdaŭra kaj influa redaktoro de *Informilo por Interlingvistoj*, la posteulo de la iama *Novaŭletero por Interlingvistoj* (vidu Fiedler kaj Brosch 2016); ke la Universala Kongreso en Prago, en 1996, donis la okazon por la organizo de la unua Nitobe-Simpozio, plurlingva konferenco pri lingvopolitiko kiun esperantistoj organizis sed kies fokuso ne estis Esperanto mem sed lingva demokratio kaj lingvaj rajtoj (Fettes 1997; Fettes kaj Bolduc 1998); kaj ke en 1999 Christer Kiselman lanĉis la revuon *Esperantologio / Esperanto Studies* (EES) kiel posteulon de la revuo *Esperantologio*, redaktita de Paul Neergaard de 1949 ĝis 1961 (vidu Tonkin kaj Raola 2020). Ĉiuj ĉi evoluoj montras pli kaj pli da memfido sur la kampo kiel tuto: fido, ke ni havas ion valoran por diri, ne nur inter ni mem, sed kiel partoprenantoj en multe pli vastaj dialogoj kaj kunlaboroj.

La unuaj jaroj de la nova jarmilo alportis novan influan aktoron sur la scenejon. Temas pri la usona fondaĵo ESF, Esperantic Studies Foundation, kiu fakte fondiĝis jam en 1968 sed kiu komencis aktivi multe pli vastskale post la ricevo de granda heredaĵo de la usonaj aktivuloj Cathy kaj Bill Schulze. Nia fokuso ĉi tie estas CED, sed ni devas ne subtaksi la gravecon de la financa helpo, kiun ESF donis al CED tra la lastaj 15 jaroj, unuavice, sed ne nur, per la Programo de Interlingvistika Subteno kiu ebligas al CED disdoni malgrandajn subvenciojn por interlingvistikaj esploroj. Ankaŭ la sukcesa daŭrigado de la Nitobe-Simpozioj – tra 2005 (Vilno), 2007 (Tokio), 2013 (Rejkjaviko), 2018 (Lisbono), kaj 2021 (Belfasto) – ŝuldiĝas nelaste al la malavara financa subteno de ESF. Menciindas ankaŭ la relative nova retejo de CED, *interlingvistiko.net*, kiu same estas frukto de tiu daŭranta kunlaboro.

Krome, la rigardo de la sociaj sciencoj al Esperanto fundamente ŝanĝiĝis en la lastaj du jardekoj. Ĉirkaŭ la jaro 2000, parolante kun la ĉefo de la lingvistika fako en la Universitato de Kalifornio en Berklio, mi estis informita, ke ju pli serioze oni studas lingvistikon, des malpli oni interesiĝas pri fenomenoj kiel Esperanto. Hodiaŭ mi dubas, ĉu eblus tiel neta deklaro,

se konsideri la multiĝon de fakaj studoj pri “konstruitaj lingvoj” ĝenerale kaj Esperanto kiel aparta kazo (Goodall 2023). Ne nur sur la kampo de lingvistiko, sed pli vaste, pli kaj pli ofte aperas valoraj studoj de homoj, kiuj mem ne estas esperantistoj, sed trovas la lingvon kaj ĝian historion indaj je sia tempo kaj profesia atento. Kvankam CED ne povas pretendi, ke tiu evoluo estas plene ĝia atingo, mi tamen kredas, ke CED signife kontribuis al ĝi, kaj ke CED plu ludos utilan rolon en la interkontaktigo kaj kunlaborigo de pli kaj pli vasta komunumo de esploristoj.

Samtempe, multo restas nekontentiga. Ekzemple, la CED-estraro nur nun komencas aliri la demandon, kion CED povas fari, kunlabore kun ESF, por pli bone konservi kaj alirebligi la bibliotekojn kaj arkivojn de materialoj pri Esperanto kaj planlingvoj. Nia enirpunkto sur tiu kampo estas la Biblioteko Hector Hodler, kies transdonon al la Nacia Biblioteko de Pollando CED sukcesis aranĝi en la komenco de 2023; sed la problemo estas tutmonde vasta (Novotníčková 2015). Sur alia kampo, en la pasinteco, CED organizis kolokvojn pri la instruado de Esperanto kaj interlingvistiko en universitatoj, sed ankoraŭ mankas kulturo de kunlaboro, kreado de komunaj studmaterialoj, interŝanĝo de pedagogiaj aliroj, kaj simile. Kvankam la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) ankaŭ aktivis sur tiu tereno, ĝis nun ne estis granda progreso. Mi persone aparte ŝatus, se CED povus revigligi la terminologian agadon, kiu komenciĝis tiel promesplene sub la Terminologia Esperanto-Centro (TEC) en la 90aj jaroj, kaj kiu nun povus disponi pri teknikaj rimedoj neimageblaj en tiu epoko – interalie, ciferecaj tekst-korpusoj kaj la validigo de terminoj per amaskunlaborigo de uzantoj (Bowker 2019).

Kaj tio estas nur, ni diru, la endogena flanko de CED, tiu turnita al la bezonoj de la Esperanto-komunumo mem. Se ni pensas pri la malnova celo de Lapenna, konvinki la mondon per faktoj kaj analizoj ke ĝi bezonas Esperanton, aŭ eĉ pri pli modesta celo, ke multlingveco ricevu taŭgan atenton en la aliroj de la ŝtatoj kaj la interŝtataj organizoj al daŭripova evoluigo, homaj rajtoj, kaj simile, ne estas klare ke ni faris grandan progreson (Tonkin 2023). Unu el la nunaj projektoj de CED, sub gvido de nia estrarano Michele Gazzola, estas ellabori indeksojn de lingva justeco kiel rimedo por tiri politikan, publikan kaj sciancan atenton al tiaj demandoj (Gazzola, Wickström kaj Fettes 2023). Malgraŭ ĉio, kion mi diris pri la kreskanta akcepto de Esperanto kiel tereno por serioza esplorado, ankoraŭ mankas socia scienco kiu estus adekvata al la demandoj, kiujn Esperanto starigas por la monda lingvo-sistemo kiel tuto. Espereble CED, en la venontaj jaroj, sukcesos kontribui al ties evoluigo.

Bibliografio

- Bowker, Lynne. 2019. "Terminology." En *Routledge Encyclopedia of Translation Studies*, redaktis Mona Baker kaj Gabriela Saldanha, 579-583. London: Routledge.
- Fettes, Mark. 1997. "Esperanto and language policy: Exploring the issues." *Language Problems and Language Planning* 21 (1): 66-77.
- Fettes, Mark. 2009. "Mi kvazaŭ trovis min ĉeĥjme: Biografia konversacio kun Humphrey Tonkin." En *La Arto Labori Kune: Festlibro por Humphrey Tonkin*, redaktis Detlev Blanke kaj Ulrich Lins, 1-24. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Fettes, Mark kaj Suzanne Bolduc, red. 1998. *Towards Linguistic Democracy / Vers la démocratie linguistique / Al lingva demokratio*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Fiedler, Sabine kaj Cyril Brosch. 2016. "Detlev Blanke (1941-2016)." *Informilo por Interlingvistoj* 99 (4): 2-6.
- Gazzola, Michele, Bengt-Arne Wickström kaj Mark Fettes. 2023. "Towards an index of linguistic justice". *Politics, Philosophy & Economics*: 1-28. <https://doi.org/10.1177/1470594X231158657>
- Goodall, Grant. 2023. "Constructed languages." *Annual Review of Linguistics* 9 (1): 419-437. <https://doi.org/10.1146/annurev-linguistics-030421-064707>
- Lapenna, Ivo, Ulrich Lins kaj Tazio Carlevaro. 1974. *Esperanto en Perspektivo: Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo.
- Lins, Ulrich. 2014. "La du flankoj de Ivo Lapenna." *Beletra Almanako* 8 (19): 121-137.
- Novotníčková, Katarína, red. 2015. *Arkivoj kaj bibliotekoj: kiel protekti kaj konservi nian heredaĵon*. Partizánske: Espero.
- Piron, Claude. 1991. "Un cas étonnant de masochisme social." *Action et pensée* 19: 51-79.
- Tonkin, Humphrey. 1997. "Language as a social phenomenon: A perspective on the emergence of sociolinguistics." En *The Early Days of Sociolinguistics: Memories and Reflections*, redaktis Christina Bratt Paulston kaj G. Richard Tucker, 247-252. Dallas, TX: Summer Institute of Linguistics.
- Tonkin, Humphrey kaj Orlando Raola. 2020. "Antaŭparolo." *Esperantologio / Esperanto Studies* 1 (9): 6-8.
- Tonkin, Humphrey. 2023. "Introduction: Diversity of language, unity of purpose." En *Language and Sustainable Development*, redaktis Lisa McEntee-Atalianis kaj Humphrey Tonkin, 1-10. Cham: Springer.
- UEA. 2023. *Centro por Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj*. Konsultita la 8-an de februaro 2023. <https://uea.org/asocio/CED>.

Pri la aŭtoro

Mark Fettes estas la direktoro de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj kaj asocia profesoro pri edukado en Universitato Simon Fraser, Kanado. Liaj esploroj traktas interalie la mastrumadon kaj revigligon de indiĝenaj lingvoj, la sociologion de la Esperanto-komunumo, kaj multlingvismon en la programoj de Unuiĝintaj Nacioj.

Retadreso: mfettes@sfu.ca

ORCID-numero: 0000-0003-4147-7879

About the author

Mark Fettes is the Director of the Centre for Research and Documentation on World Language Problems and Associate Professor of Education at Simon Fraser University, Canada. His research deals with the management and revitalization of Indigenous languages, the sociology of the Esperanto community, and multilingualism in the programs of the United Nations.

Sur l'auteur

Mark Fettes est directeur du Centre de recherche et de documentation sur les problèmes linguistiques mondiaux et professeur agrégé d'éducation à l'Université Simon Fraser, au Canada. Ses recherches portent entre autres sur la gestion et la revitalisation des langues indigènes, la sociologie de la communauté espéranto, et le multilinguisme dans les programmes des Nations Unies.

CED at 70: History, accomplishments, prospects

Abstract: Founded in 1952, the Center for Research and Documentation on World Language Problems (CED) has evolved from its initial goal, to provide facts and analyses in support of the international language Esperanto, to a multifaceted research institute on language planning and language management in a global context. A key turning point came in the last two decades of the 20th century, when various periodicals and conferences helped to create and mobilize an international network of researchers on Esperanto studies and interlinguistics. This likely contributed to the growing acceptance of Esperanto as a worthy topic of research in various disciplines; on the other hand, the broader goal of states and intergovernmental organizations dedicating serious attention to multilingualism in the context of sustainable development, human rights, and the like remains elusive. CED continues to foster and support research in this field, while simultaneously seeking solutions to various ongoing

challenges to academic work on Esperanto, among other things the preservation and accessibility of collections and the analysis and development of specialized vocabulary within the framework of international terminology science.

Keywords: Esperanto studies; Interlinguistics; Language planning; Multilingualism; History of sociolinguistics.

CED à 70 ans : Historique, réalisations, perspectives

Résumé : Fondé en 1952, le Centre de recherche et de documentation sur les problèmes linguistiques mondiaux (CED) a évolué de son objectif initial, à savoir fournir des faits et des analyses à l'appui de la langue internationale espéranto, à un institut de recherche à multiples facettes sur la planification et la gestion linguistiques dans un contexte mondial. Un tournant décisif s'est produit au cours des deux dernières décennies du XXe siècle, lorsque divers périodiques et conférences ont contribué à créer et à mobiliser un réseau international de chercheurs sur l'espéranto et l'interlinguistique. Cela a probablement contribué à l'acceptation croissante de l'espéranto en tant que sujet de recherche valable dans diverses disciplines; d'autre part, l'objectif plus large, que les États et les organisations intergouvernementales accordent une attention sérieuse au multilinguisme dans le contexte du développement durable, des droits de l'homme, etc., reste largement hors de portée. Le CED continue de favoriser et de soutenir la recherche dans ce domaine, tout en cherchant simultanément des solutions aux divers défis actuels des travaux universitaires sur l'espéranto, entre autres la préservation et l'accessibilité des collections et l'analyse et le développement du vocabulaire spécialisé dans le cadre de la science terminologique internationale.

Mots-clés : Esperanto studies ; Interlinguistique ; Aménagement linguistique ; Multilinguisme ; Histoire de la sociolinguistique.